2.ª JARO N.° 28 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 DECEMBRO 1937

# POPOLA FRONTO

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## KRISTNASKO

En la malnova Eŭropo, eĉ por homoj indiferentaj al la mitoj de la kristana religio, havas ian ĉarmon la ĉiujara jubileo pri la naskiĝo de Kristo. Eble ne estas fremda al tio la meteorologio de ĉi tiu sezono: Neĝo sur kampoj k rigora frosto pelas la homojn al paca kuniĝo en familio, apud la karesa varmo de la hejma forno, dum Legendo, tiu milda feino, ŝpinas sinsekve la linon de siaj naivaj delikataj historioj.

Kun cerbo iomete forgesema, multaj plenkreskuloj ŝatas ankaŭ rememori pri la infanaj tempoj ĉe la kristnaska epoko, kiam la simplaj revoj efektiviĝas, en agrabla k dolĉa realo, tra la artefaritaj branĉetoj de simbola arbo, pli aŭ malpli ŝarĝita de ludiloj k marcipano. Sekvante la turnojn de la fabela ŝpinilo, estas afabla ripozo k ĉasta plezuro festi, apud tablo, en kara akompano, la naskiĝon en Betlehemo—ĉu vero? ĉu fantazio?—de la bona Dio-infano, filo de Maria edzino de Jozefo la ĉarpentisto.

En la moderna tempo, la basa voĉo de la kristanaj pastroj ripetas la vokon: «Paco sur tero inter ĉiuj homoj kun bona volado!» Optimista aklamo, kiun anĝeloj pie diris, al la tuta mondo, okaze de la humila naskiĝo de Dio sur pajla kuŝejo, nur varmigita nature dank' al spiroj de mulino k bovo...

Pacon al homoj kun bona volo... ho, kiel bela k ŝatata melodio! Sed, ho ve, kiel rikane ĝi sonoras hodiaŭ en Hispanio, kie pro nia bona volo venis kruela milito; kie, pro nia bona volo fidi al ĵuro de perfiduloj, jam duan Kristnaskon, niaj buboj ne manĝas marcipanon nek ludas per novaj ludiloj, sed ili falas k mortas terure dispecigitaj, kun malfermaj okuloj—en malbeno aŭ apelacio—pro la dikaj bomboj de l' faŝismo internacia, kiu murdas k murdas, ŝiras k detruas uzante, sen krevo de lango, la nomon de Dio—ho, kia blasfemo!—de tiu sama Dio, kiu estis infano k naskiĝis precize sur trogo por oferti pacon, kiel altan premion al homoj havantaj la simplan trezoron de animo kun tre bona volo...

Flokoj de neĝo ornamas kruele la pejzaĝon de la batalkampoj. Tie, la frosto vundas pli ol la kugloj! Sed tie, kun flamoj en koro, staras firme la antifaŝistaj soldatoj eble memorante, okaze de la Kristnasko, ke Jesueto, kiam fariĝis viro, ankaŭ fermis la pugnon por svingi skurĝon kontraŭ la filistrojn, kiuj transformis la templon en borson de marĉandoj, kiel faras nun multaj filisteoj!

## LA VERO ESTU NIA ADVOKATO!

La brita deputito majoro Attlee, k liaj akompanantaj kolegoj, komencis plenumi sian promeson disvastigi la klaran veron, kiun ili vidis okaze de ĵusa vojaĝo tra Hispanio. Tamen, la sobra vero, kiun proklamas nun aŭtoritataj lipoj, estas nur okula vero, ĉar la jura vero estas jam sufiĉe konata.

Jes! pri nia rajto k pravo, honeste neniu povas dubi, eĉ ne la diktatoraj ŝtatoj, kiuj abomene atakegas nin sen antaŭaj ofendoj niaflanke. La funebra Komitato de Londono evitas singardeme konkretajn deklarojn pri tiu punkto. La diplomata rondo ĵongle kaŝis la etikajn principojn, farante malklertajn kapriolojn por ne fari normalajn paŝojn... Sed malgraŭ tio, en la ĉifona Komitato—kvankam en ĝi abunde grimacas forĝitaj cinikuloj—neniu delegito estus kapabla superi la rekordon pri senhonteco akceptante: unue, ke iu legitima registaro, abrupte atakata de ribelintaj militistoj, estas egala en rajtoj, antaŭ la leĝo internacia, al la perfida bando; k due, ke ajna lando povas esti invadita de fremdaj regulaj armeoj je preteksto de ĝiaj privataj problemoj. Ni ripetas, tre laŭte, ke neniu kuraĝus publike defendi, per propra buŝo, tian absurdan doktrinon. Neniu! nek Germanio, nek Italio, kiuj aplikas la metodon. Nek Anglio, nek Francio, kiuj aplikas... la konsenton. Ne, milfoje ne! nia rajto—la Rajto!—neniel estas en juĝo. Tion ĉiuj agnoskas, almenaŭ en la kalaj ĉeloj de sia propra konscienco, spite al la triviala farso de banala ignorado, kiun ludas eble por trompi sin mem, trompinte jame neniun, la grandaj demokrataj potencoj de la kadukiĝinta Eŭropo.

La eksterlandaj delegacioj, vizitantaj la urbojn k la frontojn de la Respubliko, ne bezonas defendi nian rajton, pri kies pureco ne ekzistas dubo en kapo de amikoj k malamikoj. Por tiu bonanima, sed tro simpla, celo ne valoras la peno eluzi la plandojn de ŝuoj aŭ la kaŭĉukon de aŭtomobilaj radoj. Sen rekta vojaĝo al Hispanio, kiel sen rekta veturo al Ĉinio, oni scias tute trafe sur kia flanko staras la morala vero. Nu, k la fakta vero? aŭ pli vulgare dirite, la vero pri nia forto, ne la vero pri nia rajto. Tio, nur tio, ricevas definitive plej altajn kotizojn ĉirkaŭ la temo de diplomata babilado.

La anglaj k francaj parlamentanoj, honorindaj gastoj, dum kelkaj tagoj, de niaj obstinaj emocioj, povas malkovri novajn—mirindajn!—aspektojn de nia epopeo. Ni, la hispanoj, en nia historia tragedio, ne jam nur havas la pravon sed ankaŭ la forton! Nia entuziasmo, nia diligenteco, nia konscia disciplino k nia tradicia ŝato al la libero faris la miraklon. La seriozaj delegacioj el bonaj amikoj devas rakonti ĉion, kion ili rigardis per la fizikaj okuloj ne tra la favora lenso de politika aŭ simpatia koincido kun la fina celo de nia deviga batalo. Nia vero ne almozas komplimentojn; nia doloro ne ŝatas la retorikon; nia nuna etapo estas frukto de niaj amaraj spertoj pro hipokrita rifuzo de nia primitiva vero, kiu ŝanĝiĝis perforte en armita vero, sola vero, kiu pezas konvinkige en la speciala pesilo de multaj kancelarioj.

Tiu vero, do, estu nia advokato. Pri tiu, ŝajne, stranga kredaĵo el pravo k forto, devas agitadi en siaj landoj la sinceraj amikoj de la hispana civitanaro. La lastaj vizitantoj konfesis, ke antaŭ ol la ekveturo oni parolis al ili inside pri tumultema popolo, k ili trovis ĉi tie ordigitajn amasojn; oni aludis pri hordoj sovaĝaj, k ili trovis ĉi tie perfektajn brigadanojn kun disciplino, konscio k kuraĝo, ĉefaj kolonoj de taŭga armeo, kiu batalas ne por unu kasto sed kontraŭ ĉiuj kastoj; ne kontraŭ unu popolo sed por ĉiuj popoloj! Dum la la soldatoj batalas heroe, rapidigante verdikton kun laŭroj de venko por justo, Hispanio prezentas ankaŭ, kiel akson de sia potenca kuraĝo, al la universala juĝantaro, la veron de sia ekzemplo, kies reflektoj estas decidaj ĉar, sur la fronto internacia, la mensogoj estis por ni pli damaĝaj ol blekado de kanonoj. Kaj la saĝa instinkto de aliaj popoloj vekiĝos k marŝos finfine, por frandi mielojn, sur la sama vojo, kiun signis unue per sango nia romantika vero!



DELBOS
vojaĝa ministro

# La C. N. T. kaj la Unueca Agado Internacia de la Proletaro

**Kiam ni parolas pri la *fakta* ĉiutendenca unueco *ekzistanta* en Hispanio kontraŭ la faŝismo, moke aŭ skeptike ridetas kelkaj sektemuloj, rajdante sur torditaj informoj de senrespondecaj izoluloj. Ni bone scias, ke ne sufiĉas esti honesta, oni devas tion pruvi! Jen do pruvoj: Antaŭ kelkaj tagoj, ĵaŭdon 9. Decembro 1937, en Valencio, ĉe unu centra organo de C. N. T. Fragua Social (Socia Forĝejo) aperis, kun la supra titolo, aktuala k interesa redakcia ĉefartikolo, kiu ŝajnas originale verkita de ni mem por nia gazeto. Ĉi sube ni prezentas ĝin preskaŭ kompleta, laŭ treege fidela traduko, kiun certe multe ĝuos k profitos la veraj amikoj de la unueco, kiuj estas samtempe la veraj amikoj de Hispanio.**

La lukto kontraŭ la faŝismo interesas tute same al ĉiuj branĉoj de la laborista movado. Neniu el ili povus postvivi la katastrofon, pro reakcia venko, k ankaŭ izolite neniu el ili estas en kondiĉoj por alfronti sukcese la defendan batalon. Malmultaj cirkonstancoj estos tiel favoraj, kiel la nuna, por efike unuigi la klopodojn de la proletaro, el ĉiuj landoj, en komuna agado celanta la detruon de l' faŝismo. Antaŭ la pezaj batoj de la realo, fendiĝas la malcedemaj pozicioj, kiuj disigis nin, unuj de la aliaj, en la flegado de privataj opinioj pri tendenco aŭ metodo. Ni konstatas nun tre fortan unuigan fluon, kiu akiris gravan aspekton pro la kolektiva aliĝo de la sovetaj sindikatoj en la Sindikata Internacia Federacio. Se tio jam estis ebla; se, por trafi tiujn ĉi rezultatojn, cedis la sektoroj plej pasie rifuzintaj fandi siajn fortojn en unusola bloko; ne estas do jam tro malfacile por la laboristaj organizoj, el ĉiuj landoj, atingi nun tuj fratan interkonsenton.

La C. N. T. estas movado, kiu, en Hispanio, levas kun pleja energio—aplikante en la tasko fervoron k lojalecon—la principojn por unueco, en la lukto kontraŭ la invadintoj. Ekde la unua momento, ĝi sciis kompreni, ke por venki en la ekzerco, kiun trudas al ni la milito kontraŭ tri potencoj, estas nepre necese forlasi provizore la intencojn efektivigi, tutece, la privatajn idealojn de ĉiu el la sektoroj en lukto kontraŭ la perfido. En honoro al tiu bezono, la C. N. T. lernis forĵeti el si ĉion, kio povus esti baro por akordo kun la U. G. T. en la sindikata kampo k eĉ kun la sektoroj marksistaj k respublikanaj en la politika k socia medioj. Sed nia Organizo ne devis limigi naciece siajn unuigajn klopodojn. La lukto kontraŭ la faŝismo, kvankam en Hispanio ĝi havas la neŭralgian punkton, estas precipe afero internacia. Jen do kial la C. N. T. reflektas eksteren siajn zorgojn pri unueco, celante ke samaj kaŭzoj nasku samajn bonajn efikojn ol tiuj, kiuj okazas sur la duoninsula areo. Larĝa mobilizo de ĉiuj proletaj energioj, sen distingo pri nuancoj nek doktrinoj, foririnte de la taktiko rigardema aŭ de la platona simpatio, povas kontribui, laŭ impona ritmo, rapidigi la venkon, por la lojalaj armiloj, en la hispana areno. Ĉefaj punktoj de tiu urĝa programo povus esti:

UNUE.—Aktiva agitado internacia por devigi la registarojn restarigi la liberon je komerco kun la Hispana Respubliko.

DUE.—Bojkoto al ĉiuj varoj destinitaj al la ribela zono.

TRIE.—Lukto kontraŭ la spionado de ĉiuj provokemaj internaciaj bandoj de la reakcio.

KVARE.—Ekonomia k teknika helpo al la popola zono.

La C. N. T. plenumas sian revolucian devon penante vivigi la proletan fronton per tutmonda premo kontraŭ la faŝismo. Jen do: aŭ la proletaj organizoj agas laŭ postuloj de la cirkonstancoj, aŭ tragikaj rezultatoj ne malfruos. La faŝismo gajnis gravajn postenojn en la mondo, ĉar la proletaro ne kuraĝis akcepti la duelon en sia vera senco, nek povis kompreni la rolon de fakta universala solidareco. Dum oni batis nin, en unu lando, la organizoj de ceteraj nacioj konsideris sin kvazaŭ neŭtralaj. Ankoraŭ estas tempo reagi! C. N. T. montras vojon: Liberecanoj, socialistoj, komunistoj! ĉiuj kune en la krozado kontraŭ la reakcio! Vasta mobilizo por la defendo de Hispanio k fundamentaj akiraĵoj de la proletaro loĝanta en demokrataj reĝimoj!

## SKOLTA VOĈETO

Tanĝero (Maroko) 26. Oktobro 1937.

Al Direktoro de POPOLA FRONTO.

Per tiuj ĉi linioj, mi vin petas bonvole publikigi jenan refuton:

«En la pola revuo «Skaut» mi legis leteron de la naela agento de SEL (Skolta Esperantista Ligo) en Hispanio s-ro Marqueta, el Zaragozo; li pretendas paroli je la nomo de multaj skoltoj de Hispanio, sed ne je la nomo de ĉiuj veraj skoltoj, ĉar niaj hispanaj geskoltoj estas nun apud sia legitima Registaro, kiel bonaj civitanoj k lojalaj skoltoj.

S-ro Marqueta, en sia letero, parolas «pri la lukto kontraŭ la komunista fantomo»; sed, ĉu li ne scias, ke multaj polaj skoltoj ne opinias kiel li? Unu el la skoltaj leĝoj malpermesas en siaj vicoj politikan agitadon por eviti barojn en la vojo al la universala paco k frateco. Ĉu li ne scias ankoraŭ, ke la faŝismo detruadis en Germanio k Italio la skoltan movadon?

S-ro. Marqueta! mi komprenas perfekte, ke vi estas en faŝista zono de invadita lando. Sed, ĉu vi ne trovis ĝenojn por skribi al eksterlando sen diri, ke vi luktas por «liberigi la patrion de la komunista fantomo?»

Antaŭdankante, estimata Direktoro, pro via komplezemo mi vin salutas skolte k samideane.

M. DODO

## MORTIS HONESTA PIONIRO!

Ĉe la unuaj horoj de la dimanĉo 12. Decembro, mortis en Barcelono Anĝelo Pestaña, kuraĝa pioniro k fondinto de la Sindikatista Partio. Ekde plej frua infanaĝo li spertis la batojn de mizera vivo, per propra penado li akiris kulturon k prestiĝon en la laboristaj medioj; sen forlaso de aktiva praktikado de sia horloĝista metio, en kio li estis tre lerta kvalifikita fakulo, li dediĉis sian kroman tempon por organizi la proletaron. Li estis unu el la fondintoj de la C. N. T. k suferis du gravajn atencojn de la monarkia polico, kiuj, se ne sukcesis mortigi lin, almenaŭ treege difektis lian organismon. Post la starigo de la Respubliko, li konsideris necesa la partoprenon de la proletaro en la politiko, fondinte tiucele la Sindikatistan Partion, kio direktis al li laŭdojn k cenzurojn el la vicoj de la C. N. T. Dum la milito, li kun sia partio apogis senkondiĉe la diversajn popolfrontajn registarojn, kvankam en ili, ne estis li rekte reprezentata. La figuro de Pestaña estas rimarkinda por la esperantistoj. En la jaro 1920, kiel delegito de la C. N. T., li proponis en sindikata Kongreso, okazinta en Moskvo, la alprenon de Esperanto kiel proletan lingvon.

**La esperantisto nepre devas esti homo sentema kaj civitano liberal**




Satigante la hienon per aliaj viandoj

# BLAGOJE PAROVIĈ

La Brigado estis mobilizata por partopreni en la ofensivo de Brunete. La Brigado ne havis tiam komisaron k, por la proksimaj bataltagoj, estis bezonataj bonaj komisaroj.

La antaŭan tagon, por komenco de la ofensivo, estis elektata komisaro de la Brigado jugoslava kamarado Blagoje Paroviĉ. Komencis la atako; la soldatoj per manbomboj ekmalfermis al si la vojon. Apud ili marŝadis la tankoj k, interne de unu el ili, la komisaro Paroviĉ kun kelkaj oficiroj de la Stabo.

Estis nepre necese apliki plejan energion por malantaŭenirigi la malamikon. Urĝis la ĉeesto de la komisaro ĉefronte de la Brigado. Paroviĉ malfermis la pordeton de la tanko k elsaltis teren...

En tiu ĝusta momento, senkompata kuglo alportis al li subitan morton. La soldatoj vidis lin fali, k anstataŭ senkuraĝiĝi pro tio, ili sin ĵetis kun impeto sur la faŝistajn tranĉeojn por lin venĝi. La Brigado iris al la atako kun kuraĝo neniam antaŭe vidita.

Paroviĉ mortis ĉe la pordo de hispana vilaĝo, kiun li ne konis. Li estis veninta el Jugoslavio por aktive helpi la tutmondan Popolfronton. Ĉiuj liaj kamaradoj en batalo ploris lian morton k akompanis lin ĝis la tombejo. En simpla tombejo ripozas liaj restaĵoj. Florkronoj kovras la teron k en la rubandoj ankoraŭ oni povas legi la dediĉojn, iom formalaperintaj pro la aero k la pluvo. Tie estas kronoj de Jugoslavio k Polio, de ĉiuj partioj k sindikatoj de Hispanio.

Omaĝe al jugoslavo Blagoje Paroviĉ k al kubano Pablo de la Torriente, alia komisaro, pri kies heroa morto ankaŭ mi raportos alifoje, ambaŭ trovintaj la morton je defendo de Madrido, la Popola Fronto de nia ĉefurbo ĵus dediĉis memortagon.

Hodiaŭ, sidante ĉe la loko, kie ci falis, Blagoje Paroviĉ, mi ankaŭ volas dediĉi al ci ĉi tiujn humilajn liniojn por ke cia laŭdinda ekzemplo estu konata de niaj eksterlandaj kamaradoj.

Rikardo KILES

Fronto de Brunete, 4-12-27.

**SE...** la ŝarĝlaboristoj, ĉu en havenoj ĉu en fervojoj, en la demokrata Eŭropo, k ĉiuj trafiklaboristoj en la demokrataj landoj estus rifuzantaj prilabori ĉiujn varojn k militilojn, kiuj estas «ne-intervene» destinataj al la ribeluloj...

**SE...** la Sindikatoj de la samaj landoj estus bojkotintaj la komercaĵojn el Italio k Germanio...

**SE...** la organizita laboristaro estus rifuzanta transporti ĉion, kion oni sendis al la frankistoj...

La hispana popolo estus ricevinta multe pli efikan apogon ol per la mona, nutra k saniga helpo, kiun ĝi ricevis, malavare sendita el ĉiuj siaj aliland aj amikoj.

Ĉar la aluditaj rimedoj estus la plej taŭgaj por kontraŭstari la *agadon* de la Internacia Faŝismo; eble iomete tro insiste, ni asertas ke la movon oni pruvas per movo. Jen simpla vero, kiun ĝis hodiaŭ neglektis niaj kamaradoj el Eŭropo. Bedaŭrindel jes, bedaŭrinde por ni k ankaŭ por ili!

# Sagetoj sen Malico

- La francoj komencas sin grati. La jukon kaŭzis la malkovro de komploto kontraŭ la Respubliko. La «Sekretaj Milicoj Revoluciaj», tamen, ne estas bandoj de banditoj, ekipitaj per armiloj italaj k germanaj por renversi la francan Popolfronton... ne. Konsistigas ilin la superpatriotoj, kiuj celas *traduki* franclingven la devizon «Supren Hispanio!» de la hispanaj falangistoj.

  Se estas hezito en la Franca registaro, ni aŭguras al niaj najbaroj, ke ili havos tre *oportune* sian «Komitato pri Ne-Interveno-n».



CHAUTEMPS
Ĉefministro de Francio

- Tre utila estis la Konferenco de Bruselo, jes! Ni ekscîis per ĝi, kion pensas, pri la Japana atenco al Ĉinio, la Angla, la Franca k la Usona registaroj.

  La mondo tremis antaŭ la sensacia deklaro de la Konferenco, ke la kunvenintoj ne pensas diskuti plue kun la japanoj. Brave! Sed la Konferenco ankaŭ donis okazon por naskiĝo de tio, kion ni povus nomi la Skandinava doktrino, laŭ kiu Svedio, Danio k Norvegio ne voĉdonis la kolektivan respondon al Japanio... ĉar tiuj tri landoj «ne havas interesojn en Ekstrem-Oriento».

  Tute ne surpriziga estas la doktrino skandinava. La malgrandaj Demokratioj lernas el la potencaj Demokratioj. La kolektiva sekureco k la Internacia Juro, bagateloj! Alloga panoramo... por la rabistoj.

- Kiam la germanaj aviadistoj bombardis Anglion, dum la mondmilito, ili estis kanajloj k murdistoj senhonoraj. Nun, ili estas kavaliroj, kiuj meritas la plej ĝentilajn vizitojn. Kial? Ĉar iliaj hodiaŭaj viktimoj estas «nur» hispanaj infanoj. Ĉu ekzistas alia pli logika konkludo?

- Diversmaniere oni komentas la decidon de Britio, sendi specialajn agentojn al la teritorio de Franko. La Brita Registaro tamen, emfazis ke ne temas pri diplomatiaj konsuloj, sed simple pri komercaj reprezentantoj por prizorgi la britajn interesojn. Kiel povus la Brita Registaro agnoski la militrajton de Franko, se ĝi *ankaŭ ne* konsentis la saman rajton al nia legitima registaro?

  Evidente ne eblas suspekti. Firme neŭtrala estas Britio. Tial ĝi flegas karese la galvanizitan Komitaton. Aŭ ĉu la suspektemuloj kredas, ke la fama Komitato servas al Franko kontraŭ ni? Simpla malico...

- En la lastaj tagoj rondiris onidiro pri ebla batalhalto *k* kompromiso, per kiu la milito en Hispanio finiĝus. Anglaj gazetoj akceptis ĝin.

  Prezidanto Negrín, pridemandite de eksterlandaj ĵurnalistoj dementis tion, dirante, ke ne estas oportuna nun la okazo por tiaspecaj ŝercoj.

  La facilaj venkoj elĉerpiĝis jam por la frankistoj. Estas el ties kampo, el kie devenas la falsa novaĵo, la premo el certaj potencoj k.t.p. Ilia nuna milita situacio ŝajnas al ili favora por eventuala kompromiso, ĉar ekde nun ili fiaskos k foruziĝos en ĉiu ofensivo. Ni estas fortaj! Tiucele, iliaj amikoj en la «demokrataj» landoj helpas al disvastigo de tute senbaza klaĉaĵo.

  Ja nia milito tro daŭras, por kelkaj «amikoj» de la hispana popolo. Nia rezisto plilongigas «ĝenan» konflikton. Dankon al la bonintenculoj, kiuj volas eviti al ni suferojn... sed ne ankoraŭ la popolo venkis k ĝi luktos ĝisfine kontraŭ Franko... k kontraŭ la bondeziroj de la bonkoraj disvastigantoj de «plaĉaj» falsaĵoj. Almenaŭ tia estas nia «malbona» intenco!

# ŜULDO DE JUSTECO

Majoro Attlee, unu el la ĉefaj gvidantoj de la Brita Laborpartio, ĵus venis al Hispanio. Okaze de lia vizito al Valencio, la socialista ĵurnalo de tiu ĉi urbo *Adelante* (Antaŭen) dediĉis al li artikolon, el kiu ni eltiras fragmentojn:

«Ni aspiras diri kelkajn veraĵojn. Ni akceptas kun estimo ĉiujn vizitantojn, kiuj meritas tion. Vi rajtas esti akceptata tiel. Ni prezentas al vi krude nian doloron.

Vi ankaŭ meritas tion!

Ni agus stulte aspektante kontente por esti agrablaj al vi. Tio al vi ne plaĉus. La vero ne kunfandiĝas kun la hipokriteco. La vero estas, ke Hispanio suferas. Al nia popolo oni forrabis la ridetkapablon. Vi scias, kiu forprenis ĝin.

De sia alta fiero, kelkaj eŭropaj politikistoj vidas nin tre malgrandaj. Ni ja estas tiaj. Sed en la fundo de nia eteco restas ankoraŭ salivo por kraĉi sur ilian grandecon.

Ili aljuĝas al si la rajton damaĝi nin. Kaj ni silentas. Sed ili postulas nian dankemon. Nel Tio ne estas ilia rajto; ĝi estas nia. Kaj ni rifuzas ĝin al ili.

Jam de pli ol dek ses monatoj Hispanio sangas k ruiniĝas. Ĝi perdis siajn plej bonajn filojn—niajn plej bonajn kamaradojn—Fremdaj armeoj kun helpo de perfidantoj invadas k detruaĉas nian landon.

Kelkaj miloj da malindaj hispanoj, kredante sekurigi siajn poŝojn, fosis kavon, en kiu estas enterigotaj iliaj monujoj kun iliaj korpoj. Du faŝistaj potencoj subtenas ilin, serĉante ekonomian profiton k strategiajn poziciojn. Nek la perfidintoj nek iliaj subtenantoj estus ekagintaj, se aliaj personoj ne restus senagaj...

Hispanio estis pacema popolo. En sia Konstitucio—ekzemplodona k naiva—ĝi estis rezigninta pri milito. Ĝia sola alianco estis kun la t. n. «Ligo de Nacioj». Subite, eksteraj k enlandaj ambicioj puŝis nin en la teruraĵojn de la lukto. Estis surpriza atako, sed ni venkis. Kiam ni estis venkintaj la ribelon, envenis la eksterlandanoj. Ili venis, ĉar oni toleris al ili veni. Vi scias, kiu permesis tion...

Oni ŝlosis por ni la Internacian Juron. Estiĝis la «Ne-Interveno» por malhelpi al ni akiri armilojn, sed ĝi ne estiĝis por eviti la trudojn de Germanio k Italio. La portugala landlimo malfermiĝis por la ribelantoj; sed la franca landlimo fermiĝis por la legitima Registaro. Alflugis el Köln la *Heinkel*-aviadiloj por detrui Gernikon; sed la lojalaj aeroplanoj ne povis flugi el Toulouse por savi Bilbao-n.

Oni perdis la tempon en la Komitato, prezidata de s-ro Plymouth.

Baskio estis bruldetruata.

Santander estis okupata.

Oni nun turmentas Asturion.

La vandaloj konkeris Malagon.

Madrido suferas daŭrajn torturojn kun stoika fiero.

Okazis la monstrega k hontinda krimo de la bombardado al Almerio.

Oni malhelpas, ke la franca registaro malfermu sian landlimon.

Estas nomitaj kelkaj «komercaj agentoj» en Salamanka.

Oni volas agnoski batalrajton al bandita perfidulo Franko.

Vi scias, kiu kulpas pri ĉio ĉi. Kaj ni ankaŭ. Ĝuste tial, ni taksas bone la grandan valoron de la helpo sindona, kiun vi k viaj kamaradoj, kiel socialistoj, faras al la pravo k al la justeco.

Vi povas diri en la Brita Parlamento, ke la hispana popolo konas siajn buĉistojn; ĉiujn siajn buĉistojn! Ke oni nė sukcesas trompi nin per afablaj ĝentilaĵoj, kiuj kaŝas reale mallojalajn manovrojn.

Diru tion, kamarado Attlee, Diru, ke la hispanoj ne volas petegi plorante; sed, se necese, ni scios morti abomenante.

Diru tion, nianome; en la nomo de ĉi tiuj etuloj, al tiuj, kiuj sin kredas tre grandaj. Diru ankaŭ, ke ni vidas la anglan popolon, kiel fratan popolon. Ke ni ne miksas la liberalan Anglion kun ĝia konservativa registaro. Pro tio ni ankoraŭ esperas, el la regatoj, la justecon, kiun jam longedaŭre rifuzadas al ni la britaj elegantaj regantoj.»




Madrido tente logas, sed...

## TEORIA BABILADETO

# FEŬDAJ FALKOJ EN LA MODERNA TEMPO

Ĉiu socia reformo estos daŭre utopio ĝis kiam, en tutmonda kolizio, ekmezuros siajn fortojn la proleta revolucio k la feŭda kontraŭrevolucio.

(Karl Marx en *Kapitalo kaj Laboro)*

Agnoskita jam de Marx la bezono de tutmonda revolucio, por la starigo de ekonomia sistemo pli justa, nun la teorio ricevas konfirmon tra la okazintaĵoj de Hispanio. La lando, kiu malkovris novan mondon—kiam trovi estis preskaŭ kreadi—surpasas hodiaŭ pezan periodon de sia privata historio, kun tiel vasta influo en la universala evoluo, ke ĝiaj sekvoj estos pliaj bataloj, ĉie de la mondo, por plena emancipiĝo de la laboristaro, suferanta klaso, kiun la marksista filozofio akceptas kiel bazon por la transformiĝo de despotaj metodoj je normoj de paco k ĝenerala bonstato. Jen do la graveco de la decida fenomeno, kiu nun furiozas sur la teritorio de la idoj el keltoj k iberoj. Unua ideologia lukto, ki ı, sen pura specifa karaktero je proleta revolucio, akiras tiun aspekton pro la fakto ke ĝi estas opozicio al la barbaraj intencoj por tiu feŭda strukturo, kiun ambicias la malŝatinda faŝismo-kankro, en malantaŭenema irado al la primitivaj sociaj formoj, kiel natura malamiko de ĉia progreso k civilizo. Ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en Azio, la faŝista hieno enigas ŝire siajn ungojn en la noblajn korpojn de homoj, kiuj faris la teruran pekon defendi, ĉe atako, siajn elementajn rajton dum la momento, kiam la kapitalistaj korvoj ĉirkaŭflugas, en freneza volupto, grake atendante la eblon formanĝi la karnajn ĉifonojn por satigi sian monstran apetiton.

Kapitalismo k faŝismo estas du malsamaj konceptoj, tamen la dua estas sekvo de la unua. Se oni analizas la kapitalon—konsiderante ĝin kiel ekonomian valoron de unu ekspluatanta klaso, kiu vigligas la industrion k la komercon, ĉiam kun profitaj celoj k neniam pro socia bezono—la faŝismo estas do, tute simple, la plenumanta instrumento, kiu devas ĉirimede gardi tiun absurdan sistemon, per science organiz ta barbareco, laŭ kruda respondo al la maturaj klasaj aspiroj de la proletaro. Tiuj kapitalistaj tendencoj signifas strangan revenon al la feŭdaj epokoj. Moderna ŝtato transformiĝas tiel en impulsilo por korporaciaj normoj, el arkaika sortimento, kiuj sufokas ĉiun alian metodon ekster la kontrolo de tiu ĉiopova akso. Restas do tuj sen valoro la fundamentaj reguloj por politika aŭ sindikata organizado k sekiĝas la fluida substanco de la vera demokratio. Oni kovras tiam la malĝojan panoramon per kurteno el demagogia salivo, kun brilaj ŝtofoj pri la Tradicio Ordo, Familio... kio, tradukite en popola lingvo, ŝanĝiĝas je Servuteco, Teroro k Mizero!

Oni revenas de la moderna tempo, irante malantaŭen k paŝante sur la literojn de la Historio. La tuta verkaro de Marx, estingita dum Marto 1883. kiam li mortis, ĉe brakseĝo, tiel serene kiel li vivis, staras majstre per videblaj signoj, indikante al ĉiuj homoj, kun emo al libero, la solan manieron atingi la difinitan celon: Sincera k fakta unueco, spertaj strikoj k saĝaj bojkotoj, kuraĝa atako kontraŭ la armitaj nestoj, disciplino k organizo en la batalejo dum la daŭro de socia milito. Ĉiu konscia laboristo estas fervora adepto de la paco; jes, sen ombro de dubo, sed ja nepre oni devas respondi al la abomena drako, kia estas la faŝismo, per la samaj efikaj armiloj, kiujn ĝi mem funkciigas kontraŭ nin, kiam ĝi regaĉas detruante ĝisradike la amajn esencojn, edukajn k familiajn, de ĉiuj sentimentalaj principoj de la vivo.

La kapitalistaj evangelioj pravigas jezuite ĉiujn rimedojn por atingi konkretan celon; tial la grandaj negocistoj montras siajn faŭkojn—post la groteskaj afiŝoj de la faŝista propagando—vokante pri harmonio anstataŭ klasbatalo, avare gardante la oron, akirita el honesta laborista ŝvito. Kiel paroliloj de tiu maljusteco, fluas gravaj ĵurnaloj, kiuj liveras ĉiutage al la popolo la venenon pri konformeco kun la mizera sorto k prezentante sinonimecon inter laboro k sufero, inter virto k malsato.

Intertempe, la krizo sieĝas rigore la pordojn de ĉiu proleta hejmo. La pala heroldo de la kapitalismo scias ruze, ke tiu k alia laboristo, pli aŭ malpli frue, estos senŝua piediranto ĉe la sama senlaborula kohorto... En la regno de superproduktado, la plusvaloro knedas k distribuas la riĉecon kreante samtempe sinjorojn k sklavojn. Kaj se iam la servutuloj eĉ ne estis mastroj pri sia vivo, hodiaŭ la malaltklasanoj ankaŭ ne gvidas la sian, ĉar la ĉiopova posedanta Moŝto estas la kapitalista ekonomia sistemo, kiu, sub formo de trustoj, karteloj k monopoloj, premas iom post iom, ĉiam pli k pli intense, la produktantojn devigante ilin al submetiĝo k forĵetante ilin senkompate en la malesperon, kiam ilia elĉerpita kapablo k lacaj korpoj jam ne plu liveras la muskolan aŭ meĥanikan profiton en la fako kie ili kadukiĝis por alies prospero.

La amaso, la popolo—proletaro k etburĝaro—en unu lando post alia, rezistos la atakon de siaj tradiciaj ofendantoj k efektivigos la sencon de malnovaj aspiroj, sed unuavice, en tiu parado, flirtos la standardo, kiu triumfis jam en la enkonduko de nova politiko gvidanta la plej gravan okazintaĵon de nia jarcento, ĉe la historia leviĝo de tuta nacianaro: Hispanio! kiu batalante celas forigi la danĝerojn mem de aliaj bataloj, anstataŭigante la feŭdajn falkojn, kiujn dresis la nobeloj por frivola ĉaso, per blankaj kolomboj, ĉarmaj emblemoj de la eterna amo k paco. Ĉu vere estas nepre necese fari renverson por gajni sistemon, liberan k gajan, sen regado de ekspluatado nek ia perforto?...

Ĉe tiu punkto restis la redaktoro flikante, ne tute lerte, siajn privatajn pensojn kun klasikaj teorioj, kiam abrupteta movo, pro banala kaŭzo, interrompis la skribadon k, tute hazarde, la plumo vundetas haŭton de la fingro; tuj fluas ruĝe guteto de sango, kiu falas precize sur la vorton «amo»... Eble tio signifas, ke la feliĉo venos, ne kiel pluvo de la providenco!



# NEŬTRALECO EN LA VIVPRAKTIKO

El artikolo verkita de D-ro Ivo Lapenna en *La Suda Stelo* ĉerpis parton nia tre estimata kolego *La Kritika Observanto*. Ĉar nia opinio koincidas plene kun la ideoj de la verkinto, ni ankaŭ decidis represi kelkajn paragrafojn:

«Antaŭ ĉio ni devas akcenti, ke neniam ekzistis, nek povis ekzisti, homoj plene neŭtralaj. Precipe, tio ĉi validas por la hodiaŭo, kiam la sociaj diferencoj k la el ili rezultantaj kontraŭecoj, inter la diversaj kungrupiĝoj, estas tiom akrigitaj, ke ofte necesas preni la armilojn en la manojn.

Ĉiu opulo apartenanta al tiu ĉi aŭ al tiu grupo havas tial difinitan, pli malpli, fortikan mondrigardon, kiu rilatas ne nur la pure materian vivon sed precipe ankaŭ la spiritan sferon, ampleksante eĉ la plej etajn malgravaĵojn el la ĉiutaga vivo.

Riĉeco k mizero, imperialismo, milito kaj paco, senlaboreco, arto k scienco, edukado, religio k multaj aliaj gravaj problemoj, kiuj finfine en la lasta linio rezultas ĉiam el la sama ĉeffonto, estas hodiaŭ ne nur kritike rigardataj fare de la larĝaj popolamasoj, sed ankaŭ science, aŭ pseŭdoscience, plej detale pritraktataj.

Eĉ kiam oni surstrate renkontas bone nutritan degeneritan hundon aŭ lukse vestitan virinon, aŭ ĉifonitan almozpetanton, aŭ kiun ajn alian, oni, koncerne al ĉiuj ĉi faktoj, ĉiam havas ian difinitan opinion. Iuj aprobas, la aliaj malaprobas. Unuj opinias, ke estas tute juste zorgege varti superfluan hundeton, kuirante al ĝi plej delikatajn manĝaĵojn, la aliaj pruvos, ke eble tamen estus pli homece, per la monsumo elspezita por tiu hundeto, satigi eĉ tutan familion. En la kulturaj k ankaŭ en la pure sciencaj rondoj la afero samas.

Ni komprenebie ne deziras nun detale ekzameni, kial la homoj rigardas la okazintaĵojn el kontraŭaj vidpunktoj, sed ni konstatas la fakton. La hodiaŭa individuo ne estas, nek povas esti neŭtrala. Tio ĉi estas tute homa k normala. Neŭtralaj—eble—povus esti nur tiuj homoj, kiuj ne vivas en la homara socio, sed kiuj rigardas ĝin el ekstere, kiuj do ne ekzistas. Sed eĉ supozante, ke ili ekzistus, estas tre dubinde ĉu ili restus neŭtralaj.

Estas do klare, ke ankaŭ la esperantistoj ne povas forgesi sian socian pozicion, aŭ eliĝi el ĝi k fariĝi neŭtralaj rilate al okazantaĵoj en la mondo nur pro la fakto, ke ili ellernis la internacian lingvon.»




La leono vekiĝas pro jukoj en la vosto...

Tre trafe la aŭtoro de la represita artikolo demonstracias, ke neŭtraleco en la vivpraktiko estas nuntage neebla revo. Pretendi, ke Esperanto estas kuracilo por kvietigi la kverelojn inter homoj kun diversaj celoj, estas alrigardi la problemojn de la mondo, aŭ tro naive aŭ tro ruze. Refoje ni asertas, ke la «interna ideo» de la internacia lingvo utilas nur por ke malsamnacianoj interkompreniĝu k lernu sin koni reciproke, tiel ebligante pacon inter la diverslingvaj popoloj. Tion prikantas nia himno «La Espero». Sed D-ro Zamenhof neniam diris, ke li celis per sia kreitaĵo estigi amon ĉe la ekspluatatoj al la ekspluatantoj aŭ inverse, aŭ semi la teron per dogmoj nediskuteblaj, t. e. indiferentigi la homojn pri la aferoj, kiuj ilin dividas. Tiamaniere, la progreso stagnus, la evoluo ĉesus k la lertaj mastroj regus por ĉiam. Tia situacio certe ne efektivigus la ideon pri unu homa familio, sed fuŝe pliakrigus la rilatojn inter ĝuantoj de luksa ĉambraro k logantoj kaŭraj en subtegmenta mansardo.

La sentenco: «Mi estas homo k nenio homa estas al mi fremda», validas *ankaŭ* por la esperantistoj. Se iu esperantisto renkontas samlingvanon (ni ne ŝatas la esprimon «samideano») kiu bombastas pri Esperanto, prezentante ĝin kiel panaceon por ĉiuj hodiaŭaj malfeliĉoj en la mondo, li prave pensu, ke tiu, kiu tiel prezentas la aferon aŭ estas stultulo, aŭ apartenas al la klaso de la privilegiitoj.

**Esperanto ne estu narkotiko!**

# AL HOLANDLINGVAJ ESPERANTISTOJ

# KIAL NI MERITAS VIAN SUBTENON?

Ĉio nova, ĉu ĝi kuŝas sur socia, ekonomia, politika, ĉu sur religia, filozofia, ĉu teknika aŭ alia tereno, komence renkontas malfidon, kontraŭstaron k, en plej favora okazo, indiferentecon. Tiel okazis, kiam Jesuo venis surteren, kiam la unuaj kristanoj predikis la novan religion, kiam ajna scienculo malkovris la relativecon de «eterna» vero k tiel okazos, kiomlonge nia planedo troviĝos en la Universo k, denaske konservativaj, limake malrapide pensantaj dupieduloj loĝos sur ĝi. Iamaj revoluciuloj poste fariĝis reakciaj, eĉ kontraŭrevoluciaj, kiam iliaj idealoj realiĝis k tre progresemaj homoj faris glacian mienon, kiam io nova sin anoncis k petis ilian atenton. Tiel okazis tra ĉiuj jarcentoj. Kiu ne lulas sin per iluziaĵoj k trompaj esperoj konsentos, ke koncerne al ĉio ĉi, la regulo ankoraŭ validas nun k ni, nuntempanoj, multe devas instruiĝi per la lecionoj de l' estinteco.

▼ ▼ ▼

Tiu ĉi peza enkonduko ne timigu vin, ĉar ĉio, kio ĉi-sube sekvas estas nek peza nek timiga, sed male, facile komprenebla; ĝi estas la vero k la vero estas simpla... Bonvolu do atente aŭskulti:

Antaŭ jaro k duono eksplodis milito en Hispanio, provokita ne de Sovetio, kiel asertas la purgermanoj, **sed** de la hispana reakcio, kolektiĝinta sub la flagoj de l' ribel-generaloj k konservativaj ekleziaj altranguloj. Tiu milito atakis popolon, kiu post jarcenta subpremado sukcesis havigi al si multpromesan estonton. Tion ĝi konkeris per tutdemokrata maniero k tion decidis malebligi la ribelularo per perfida, fripona metodo. Heroe protestis la popolo k per plej kara sia vivo—sia vivo!—ĝi ankoraŭ nun pagadas **sian** kontribuon en luktado, kiu koncernas ne nur la hispanan popolon, sed la tutmondan civilizon. Tuj post la ribelo, ekestis ĉiulanda simpatio, kiu manifestiĝis milmaniere. Ankaŭ el la vicoj da verdsteluloj! En Valencio aperis POPOLA FRONTO, heroldo de la vero pri Hispanio. Milojn da amikoj ĝi baldaŭ havigis al si k en Nederlando fondiĝis filio por nacilingva tradukeldono. Ekde tiam tamen, refoje montriĝis, ke io nova malfacile konkeras sian lokon. Tuj estiĝis malfido, kontraŭstaro k malinteresiĝo. Oni ne komprenis la utilon de la entrepreno k ĉar ĝi estis io nova, oni serĉis argumentojn por pruvi, ke ĝi estas frenezaĵo, aŭ almenaŭ afero tute superflua. De eminenta kamarado ni eĉ aŭdis, ke tiu nederlanda laboro estas **kontraŭpropagando** al Esperanto! Jen, historio do ripetiĝas. Tamen, la nederlandaj entreprenintoj, konsciante la gravecon k praktikan valoron de sia tasko, serĉis rimedojn por konvinki siajn samideanojn. Sed, ĉar ili ne estas monhavuloj, ili ne povis fari grandskalan propagandon, kiu sugeste konvinkus la skeptikajn esperantistojn.

Pro tio ili kompilis tiun ĉi skribaĵon k petis la redakcion de POPOLA FRONTO engazetigi ĝin. Kial vi, leganto, ne povas doni vian simpation k apogon al viaj samlandaj amikoj? Kion celis la nederlandanoj per sia traduka laboro? Ĉefe, **eksplutati aktualajn okazaĵojn en la profito de la poresperanta propagando.** Sed ni bezonas la daŭran interesiĝon de ne-esperantisto pri nia lingvo. Tion ni sukcesos akiri nur per regule aperanta k ankaŭ por li **legebla** gazeto! Ke li interesiĝos pri nederlanda traduko de POPOLA FRONTO jam antaŭe estis certigeble, ĉar ja temis pri afero, **pri kiu ĉiu antifaŝista laboristo ne povas ne interesiĝi.** Temas pri nenio alia ol pri Hispanio, lando en kiu luktadas **unu** popolo kontraŭ la malamiko de ĉiuj civilizitaj popoloj. Per nia gazeto li aŭskultos la voĉon de tiuj, kiuj, ankaŭ por li, batalas! Kaj samtempe li **devas** memori pri Esperanto. Tial ni konservis por nia eldono la esperantan titolon, k metis sub ĝi nederlandan klarigon, ke tiu gazeto estas eldonata k verkata de hispanoj k tradukata de nederlandaj esperantistoj. Kamaradoj, ĉu tio ne estas **unika** propagando por Esperanto? Ĉu tio samtempe ne estas perfekta ligilo, kiu kontaktigas la nederlandajn laboristojn kun iliaj hispanaj klasfratoj? Ĉu eblas seninteresiĝi pri tiu afero?

Preskaŭ tri mil gazetoj vendiĝas monate en pli ol 30 urboj de Nederlando; tio signifas, **ke preskaŭ tri mil ne-esperantistoj konstante aŭdas pri Esperanto.** Gek-doj, ni ne rajtas postuli pli longan spacon, pro tio ni ne povas lumigi aliajn **principajn** argumentojn. Sed kia ajn via opinio estu, tiel pri nia laboro, kiel pri la aplikata politiko en Hispanio, pripensu, **ke ni estas en sendanĝera reĝimo, ke ni estas la ŝipestro sur la bordo;** ke la hispana popolo estas la ŝipo, kiu minacas perei, k ke ĝia Popolfronta Registaro estas la piloto, kiu devas konduki ĝin en sendanĝeran havenon... Tial, subtenu nian laboron k anoncu vin tuj, hodiaŭ mem, nun mem! ĉe

**POPOLA FRONTO**

**HOLANDLINGVA ELDONO**

**Loosduinseweg, 179 HAGO (Nederlando)**

# KIAM...

Hitler manovrigas antaŭ Mussolini sian potencan armeon, tio estas por paco.

Kiam Mussolini montras al Goering la armitan forton de Italio, tio ankaŭ estas por la paco.

Kiam Sovetio, okaze de la XX.ª datreveno, montras siajn trupojn k Vorošilov deklaras, ke la rusa armeo povas «respondi ian atakon», la faŝistaj diktatoroj interpretas tion kiel «militminacon al aliaj popoloj». Esti preta al defendo estas deziri militon. La italaj k germanaj mitraliloj estas por la paco; la francaj k sovetaj armiloj estas por la milito.

Kiam Franko, agento de la internacia kapitalismo, murdas siajn fratojn, tio estas por la paco k la ordo.

Kiam Japanio atakas Ĉinion por kapti la ĉinajn teritoriojn k sklavigi la ĉinojn, tio ankaŭ estas por la paco.

Kiam naŭ potencoj garantias, per solena traktato, la integron de Ĉinio, k Japanio perfidas sian subskribon, la aliaj ok potencoj atendas en Bruselo la opinion de la atakinto k la komedio ripetiĝas kiel en Ĝenevo k Londono, tio estas por la paco.

Kiam Litvinof forlasas Bruselon, tio estas ĉar la rusoj torpedas la pacon k deziras militon.

Kiam Paragvajo k Bolivio luktas por la petrolaj kampoj del Ĉako (kies petrolan gravecon ili ne konis ĝis kiam la *Standard Oil* k la *Royal Dutch* interdisputis pro ili), tio estas ankaŭ por la paco.

Kiam Usono k Anglio liveras petrolon k benzinon al japanoj k al ĉinoj, kiel ili ankaŭ liveris aliokaze al Italio, tio ankaŭ estas por la paco.

Kiam oni pensas ke tiuj potencoj povus ĉesigi militojn ne liverante petrolon al luktantoj, tiu penso estas militcela eraro. Necesas liveri daŭre benzinon al atakintaj nacioj, por la paco; por la paco de tombejo!




En la internacia ĝardeno dejoras du bonaj ĝardenistoj

## MENSOGADO EKSTER NIA TENDO

# PUGNOBATALANTOJ

Sub tiu ĉi titolo aperis, antaŭ ne longe, artikolo en la nederlanda faŝista gazeto «Popolo kaj Patrio». Oni represigis la frontan paĝon de nia holandlingva POPOLA FRONTO k komentis ĝin. Tiu komento estas por ni, esperantistoj, lerniga k amuza samtempe, tial ni pli atentis tion ol kutime.

La faŝistoj estas kontraŭ aplikado de internacia lingvo, timante ke tiaj interligiloj estas nerompeblaj. Ili riproĉas, ke nia devizo: «La Esperanto-stelo je la servo de la luktanta hispana popolo!» portas ne nur la esperantan stelon sed efektive ĝi estas la komunista sovetstelo. Ili, verdire, presigis tion... k aldonis: «Estas ankoraŭ bonegaj popolanoj, senlime sensuspektaj, kiuj opinias ke Esperanto estas nenio alia ol eltrovo por interfratiĝo de la homaro, paŝo sur vojo al eterna mondpaco, al kio sopiregas iliaj najvaj sentoj. Ili vere nur estas tiuj, kiuj formas la plej bonan propagandterenon por la komunismo. Ilia objektiveco estas tro malmulta, ilia verdireco tro malforta por vidi, tra la bona iluzio de Moskvo, la sangan realon de la komunismo. Estas sufiĉe doni al ili devizojn kiel: «por la mondpaco» k «por fratiĝo de la homaro» por kapti ilin en la retojn de Moskvo. Ankaŭ Esperanto servas al tio; praktike evidentiĝas kial socialdemokratoj k komunistoj tiom subtenas Esperanton, ili nome bezonas ĝin por la mondrevolucio. La soveta stelo, kiu samtempe servas kiel Esperanto-stelo malkovras la veran celon.»

La stultecon pruvitan per tiu riproĉo ni ne konsideras serioze, nur la aserton ke la plimulto el ni estas naiva, malobjektiva, ni malakceptas. Fiere, ni ĉiuj daŭrigu nian laboron sciante, ke kiam la du nomitaj instancoj vere subtenos nin tiomgrade, kiom la faŝistoj imagas, ni posedos potencan aparaton kies timigeco por la faŝistoj estos pli celtrafa ol nia individua laboro jam nun efikis. Obstine, persiste, ne malobjektive k naive, ni daŭrigos nian laboron tiel, ke ni finfine atingu nian celon: Esperanto en la servo de tutmonda proletaro, por krei la ilojn por internacie pereigi nian klasmalamikon, nome: **La Faŝismo!**

P. de l'BRETO
Amsterdam

# MINERALOJ DE HISPANIO

En ĉiuj modernaj militoj k kvereloj la ekonomiaj k politikaj problemoj estas ĉiam ligitaj; hispana milito ne povas konstrui escepton. Ĝi komencis kiel milita ribelo, bone organizita; spite tion, ĝi ne triumfis subite, kiel ĉiam okazis en la historio de nia lando. Poste venis la milita helpo de Germanio k Italio por subteni la ribelon k starigi kontrolon de ĉiuj hispanaj krudaĵoj.

Nun en Germanio, la importado de fermineralo el Hispanio kreskis ĝis dekoblo, kompare al lasta jaro. La rezervoj de fermineralo en nia lando reprezentas proksimume 711 milionojn da tunoj, el kiuj oni supozas 349 milionojn da tunoj de pura fero. La rezervoj de sama mineralo en hispana Maroko estas 25 milionoj da tunoj.

En distriktoj Huelva, Riotinto, Tharsis k Santo Domingo oni trovis manganeson. En Galegio, Montoro k Kordobo estas ankaŭ trovita volfrando. En provinco Huelva ekzistas du mil milionoj da tunoj de kupra pirito; tiuj rezervoj supozas, minimume, 20 milionojn da tunoj de metala kupro.

En la zono de Almaden ekzistas rezervoj konataj k eblaj de hidrargo, kiuj formas la hidrargan minon plej gravan el la tuta mondo. Ĝis la jaro 1936, oni atingis 169.000 tunojn da tia mineralo, kiu entenas purecon de 8 %. La hispanaj rezervoj de tiu mineralo estas sufiĉaj por provizo de l' tutmondaj bezonoj dum 100 jaroj.

La hispana zono de potaso situas je kvar dek kilometroj proksime al Barcelono. Ĝi estas longa je 28 kilometroj k larĝa je 10 kilometroj k povas bone konkurenci en graveco k riĉeco kun la germana zono de Stassfurt k la franca de Alsaco.

Jen resumo de jara produktado de hispanaj mineraloj, dum lastaj jaroj: Fermineralo 2,7 milionoj da tunoj. Kupro pirito 1,5 milionoj da tunoj. Kupraj mineraloj 20.610 tunoj. Hidrargo 1227 tunoj. Blanka fero 250 tunoj. Volfrando 350 tunoj. Manganeso 693 tunoj. Karbo (lignito) 7,3 milionoj da tunoj, k sulfuro 31.130 tunoj.

Se generalo Franko venkus, Italio k Germanio povus solvi la gravan problemon nutri la faŝistan industrion. Ĝis nun Anglio importis el Hispanio pli ol unu milionon da tunoj de fermineralo el ĝiaj minoj.

# MOZAIKO

● La faŝista radiostacio Radio Falango, el Valladolid diris la 27. Novembro: «Ne estas nur la ĵurnalistoj, kiujn oni devas silentigi, sed ankaŭ la personojn tro optimistajn, ĉar ili kutimas maldiskrete diskonigi sciigojn, kiujn oni ne povas poste konfirmi. Per tio ni celas nur eviti la nunan ĥaoson; jam diris Generalo Franko, ke hodiaŭ la respublika armeo fariĝis vera potenco. Kontraŭ tia potenco ne estas eble anonci triumfojn je difinita tago».

● Jen kiamaniere la germana faŝismo ne-intervenas en nia lando: Germana aviadisto, kiu apartenas al regimento de norda Germanio k kiu devenas el Hannover, rifuzis sinsekve tri fojojn partopreni en «specialaj manovroj». Tiuj manovroj, al kiuj oni sendadas trupojn, estas la milito en Hispanio. La patrino de tiu aviadisto asertas ke, malgraŭ la rifuzoj, ŝia filo estis devigata ĉeesti la «manovrojn».

● En Linz (Aŭstrio) estas arestitaj du germanaj aviadistoj, kiuj fuĝis el germana «paradizo» por eviti novan vojaĝon al la suferanta Hispanio.

● Antaŭ kelkaj tagoj eliris el haveno Hamburgo (Germanio) la ŝipo «Kaiserslautern» kun trupoj en vojaĝo al nia lando. Oni malpermesis al la ŝipanaro eliri el la ŝipo dum la tuta vojaĝo. Oni prononcis ofte ŝovinistajn paroladojn k ĉiu soldato ricevis poŝtkarton, kies enhavo estis jam maŝinskribita. La teksto klarigis, ke la sendanto veturis al longa vojaĝo, dum kiu ili ne povos skribi denove. Ĉiu el ili apartenas al faŝista asocio *Kraft Durch Freude* (La Forto per la Gajo).

● En nia zono okazas nun monkolektoj por aĉeti vintrovestojn por la soldatoj. Tiuj monkolektoj bonege k kontentige kreskas; la C. N. T. en sia Barcelona ĵurnalo kolektis 231.000 ptojn; la sindikatoj de U. G. T. pli ol 600.000 ptojn. k la Internacia Ruĝa Helpo pli ol 700.000 ptojn. Tiuj ciferoj bone pruvas la oferemon de la hispana popolo.

● Novaj reformoj en la unuagrada instruado ĉe la lernejoj en la lojala Hispanio, donas gravan lokon al vizitado de infanoj al laborejoj, fabrikoj, minoj k ĉiuj industriaj branĉoj. Oni celas per tio kontaktigi la lernejon kun la reala vivo de la laboristaro k kun la iloj de la produktado. Ankaŭ oni enigas tiamaniere en la klerigado sociekonomiajn temojn, kiuj ĝis nun forrestis en la lerneja laboro. Oni dediĉas preferan atenton al la praktikaj metiaj laboroj de la knaboj por ke ili jam frutempe, lernu la uzadon de la laboriloj k sistemojn pri laboro.

● La faŝistoj starigas seninterrompe fortikaĵojn en la hispan-franca landlimo. Laŭ niaj sciigoj, sep baterioj de 160 mm. estas starigitaj en Guadalupe (Fuenterrabía); tiuj fortikaĵoj estas konstruitaj de maŭroj k dum la nokto. Ankaŭ ili estas kaŝitaj per arboj, ĉefe pinarboj. Aliaj baterioj aperis ankaŭ en Mirandarena, en marbordo apud la lumturo de Cap Figuier, k en la najbaraj montoj.

● Hitler ĉion kapablas, eĉ anticipi. En Augsburg li asertis: «La fremdaj landoj ne volas aŭskulti niajn vortojn pri kolonioj; post jaro ili jam estos kutimiĝintaj aŭdi nin; post tri jaroj ili konvinkiĝos, ke necesas fari ion; k post ses jaroj ili estos devigataj redoni al ni niajn ŝtelitajn koloniojn». Por elpruvi la pravon de tiuj asertoj Hitler intertempe luktas en Hispanio.

● La itala anonima societo «Ernesto Breda» fabrikanta preskaŭ ĉiujn aeroplanojn, kiuj venas al nia lando, okazigis ĝeneralan kunsidon en Milano. Estis decidata pliigi la kapitalon, de 80 ĝis 127 milionoj da liroj k la administranto raportis, ke gajnoj estas kontentigaj k la perspektivo bonega se la milito daŭras en Hispanio.

● La faŝista brazila diktatoro Vargas nuligis en Brazilio ĉiujn politikajn partiojn. Tie neniu rajtas paroli krom li. La tutmonda faŝismo komencis jam invadi Amerikon; baldaŭ daŭriĝos la vojaĝon...

● En la tuta hispana Maroko komencis granda kampanjo kontraŭ la faŝistoj. Kaŝe estas disdonataj folioj. En tiuj folioj aperas jenaj devizoj: «Hispanio por la hispanoj!» «Ĉasu la invadintojn!» La folioj estas redaktataj «kontraŭ la fremdaj invadintoj, kiuj faris el Hispanio la novan Belgion de la nova tutmonda milito».

## REHONORIGA TELEGRAMO

**Antaŭ nur unu semajno, ni ricevis el Barcelono jenan telegramon, kiun ni ĉi sube aperigas sen plia komentario:**

«Al Esperanto-Gazeto POPOLA FRONTO
Valencio, Strato Mar 25.

La unua ĝenerala kunveno de la Kontraŭfaŝista Esperanto-Komitato de Katalunujo, volas esprimi al vi siajn plej profundajn esprimojn de estimo k admiro pro via alta tasko, kiun vi plenumas por la Respubliko k Esperanto. La kunveno aprobis vian sintenon en la Kongresoj de SAT k IPE k dankas pro la bona reprezentado de nia Komitato.

Vivu la Popola Fronto! Vivu Esperanto!»



La grandeco de faŝisto estas ĉiam laŭe proporcia al la eteco de demokrato

● Ĉefgeneralo Franko nuligis ĉiujn sindikatojn en norda Hispanio. Angla gazeto *Daily Herald* komentas tiun dekreton k diras: «Tiu sciigo devus konvinki la simpatiantojn de Franko en Anglio, kiuj intencas prezenti Frankon kiel **liberiganton.**

● Per histriona gesto de Mussolini, Italio jus forlasis la ruinigitan templon de la Ligo de Nacioj. Eble, tio estas la rekompenco al la komplezoj de Ĝenevo; kiel kutime Hispanio observas alies ludojn perfektigante siajn defendilojn k uzante ilin treege efike.

Dume la intrigantoj intrigas k la naivuloj gapas...

● En Madrida fronto estis kaptitaj la direktoro k kelkaj kunredaktoroj de faŝista gazeto *Heraldo de Aragon* kiuj eniris en Madridon kredante ke la ĉefurbo jam estis faŝista. Tiuj ĵurnalistoj estas jam juĝataj k kondamnataj resti arestitaj dum kelkaj jaroj. La faŝistoj en Bilbao kaptis la redaktoron de *Euzkadi* Esteban Urdiaga, la redaktoron de *La Tarde* Heriberto de Estella k kamaradinon Juanita Mill, kiu verkis la porinfanajn paĝojn de tiu sama gazeto. Ĉiuj estas fusilmortigitaj en Vitoria, apud tombejo.

● La faŝistaj aŭtoritatoj de Romo decidis alnomi kelkajn stratojn de tiu urbo per la nomoj Malago, Gvadalajaro, Bilbao k Santander, kiel memorigo de la italaj bataloj en nia lando. Se ili decidis utiligi la nomojn de venkoj k de malvenkoj, baldaŭ ili havos novajn nomojn por sama celo, ĉar Hispanio ankaŭ scias la suferojn, kiujn tiuj nomoj vivigas por transformi ilin en simboloj de la venko.

**La fervoro, kiun mi vidis en Madrido, Barcelono kaj Valencio estas vere mirinda!**

**Tiel agrable sonoris la unuaj vortoj de la majoro Attlee revene en Londono post veturo tra Hispanio**

# NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro . . | 34'10 | ptoj. |
| A. F.—Albacete . . . . . | 20 | » |
| P. S.—Orihuela . . . . . | 10 | » |
| R. E.—Guadalajara . . . | 5 | » |
| F. S. M.—Argente . . . . | 5 | » |
| F. G.—Sueca. . . . . . | 5 | » |
| J. E.—Manzanares . . . . | 50 | » |
| F. D.—Albacete . . . . . | 20 | » |
| A. S.—Callosa de Ensarria. | 4 | » |
| J. G.—Malgrat . . . . . | 6'50 | » |
| R. Q.—Centra fronto . . . | 8 | » |
| J. O. Sariñena . . . . . | 25 | » |
| A. M.—Benetuser . . . . | 5 | » |
| O. K.—Barcelono . . . . | 10 | » |
| R. P.—Castellon . . . . | 25 | » |
| R. D.—Pozoblanco. . . . | 2 | » |
| J. Ll.—Pozoblanco . . . . | 5 | » |
| F. R.—Almansa . . . . . | 5 | » |
| F. J.—Almansa . . . . . | 25 | » |
| D. D.—Barcelono . . . . | 25 | » |
| S. D.—Pozoblanco. . . . | 25 | » |
| R.—Beyne Heusay. . . . | 6 | b. fr. |
| J. B.—Antwerpen . . . . | 11'75 | » |
| Germana k-do . . . . . | 3'50 | » |
| FLE Sekcio.—Bruxelles . . | 15 | » |
| L. H.—Ostende . . . . . | 25 | » |
| Kolektita de M. D. k W. en SAT-kongreso . . . . | 7'55 | gd. |
| H. v. d. B.—Hoorn. . . . | 1 | » |
| FLE Zamenhofa Sekcio.—Amsterdam V . . . . | 2'05 | » |
| G. J. W.—den Haag . . . | 2 | » |
| A. N.—Haarlem . . . . . | 2'85 | » |
| A. K.—Rotterdam . . . . | 1'70 | » |
| A. d V.—Halfweg . . . . | 1'15 | » |
| G. v. d. B.—Velsen . . . | 0'56 | » |
| G. D.—Zutfen . . . . . | 1 | » |
| G. E.—Zaandam . . . . | 1 | » |
| L. v. d. Z.—Belsward. . . | 1 | » |
| J. J.—Heerlen. . . . . . | 1'35 | » |

NOTO.—La 15 f.fr. antaŭe kvitancitaj sub literoj M. R. estas kolektitaj en IPE-Kongreso.

Eble pro kaŭzo de la poŝto, ĉe la fina kompostado de ĉi tiu numero, ankoraŭ ni ne ricevis la kompletan liston de donacoj. Tial nun ni ne povas plene kvitanci, kion certe ni faros en proksima numero.

# KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

BELGIO.—K-do Beeckmans Joseph, Damplein 8, Antwerpen, deziras korespondi kun esperantistaj laboristoj el aliaj landoj. Eventuale oni interŝanĝos poŝtmarkojn. Korespondado tre regula. Respondo garantiata.

## ANTIFAŜISTOJ ATENTU!

La Esp-klubo kun la Hispana Helpkomitato k la Faksindikata ĉeforganizo de Sodertalje kune, meze de januaro aranĝos ekspozicion antifaŝistan. Ni insiste petas materialon esperantistan k alilingvan. Ekz. libroj, broŝuroj, gazetoj, afiŝoj, flugfolioj, propagandkartoj, insignoj, statistikoj, ktp. Ni resendos se estos dezirate. La ekspozicio post la loka prezentado migros tra Svedio. Adr.: Karl Axelsson, Dalgatan 7, b. nb., Sodertalje (Svedio).

HISPANIO.—K-do Luis Torres, Juneca Esperanta Fako de la Grupo «Paco k Amo» Salmeron 56, Barcelona. Dez. kor. kun tutmondaj junaj proletoj 14-16-jaraĝaj p. ĉ. t. Nepra respondo.

HISPANIO.—K-do Francisco Casamayor, krozŝipo «Mendez Nuñez» Cartagena dez. kor. kun Nord-Amerikaj junuloj.

HISPANIO.—Internacia kontraŭfaŝista batalanto petas individuan k kolektivan korespondadon kun gekamaradoj el la tuta mondo. Certa respondo.
A. Fulgenci. Plaza Altozano, S. R. I., N. 341 Albacete.

## LA PAPERA PROBLEMO

Laŭ niaj supozoj, la venonta numero aperos jam kun normala papero. Tre kontente ni anticipas la sciigon al niaj karaj legantoj, kiuj en tiu aspekto, per lastaj numeroj, ankaŭ spertis pacience k dankinde la malfacilaĵojn de nia milito.

# POPOLFRONTA LETERUJO

J. W. F.—Hull.—Kun emocio ni legis vian estimatan leteron, kies fratajn esprimojn ni kordanke akceptas.

D. C.—Ymuiden.—Viajn emociajn vortojn ni dankas tre kore, salutante amike vin k la grupon da popolfrontanoj en via urbo. Pri la pag maniero, temas pri kroma peranto, sed vi k ĉiu, kompreneble, povas daŭrigi la saman proceden, kiel antaŭe.

G. Y. D.—Zutfen.—Via moka riproĉeto ne tuŝas nin, ĉar ni ne posedas aparaton, notanta aŭtomate la adresaron de ĉiuj, kiuj deziras aboni, se ili almenaŭ ne sin anoncas al ni pri tio. Ni regule sendos. Dankon!

Aŭstriano.—La peranto jam respondis al vi persone. Tamen ni diras al vi, ke ni ĝojas pri ekzisto de homoj, kiuj kuraĝas ricevi nian gazeton en terorlandoj. Multaj jam ricevas ĝin k tio estas farenda por aliaj.

H. v. d. B.—Hoorn.—Kun plezuro ni legis vian ŝatatan leteron k ni ĝojas, ke ni sukcesis kontentigi vin. Ni notis ĉiujn adresojn. La enhavo de via letero estas tre interesa k tre eble, ni skribos al vi pri ĝi pli malfrue.

A. M.—Montpellier.—Elkoran dankon pro via fervora letero. Via ideo estas sendube bona, sed nerealigebla en la nuntempaj kondiĉoj. Krom aliaj aspektoj de la afero, eĉ ne facile solveblaj, malhelpas speciale la fakto, ke ne ĉiuj loĝas kune k estus prokrastro k malfacilaĵoj por la regula eldono. Pri la cetero de via skribaĵo, ĝi meritas nian plej bonan atenton k konsenton.

K-do. Tours.—Ricevita via estimata b. k, kun salutaj vortoj, kiujn ni reciprokas, dezirante al vi sukceson en via laŭdinda laboro.

Esperanto-Grupo.—Nittedal.—Kun ĝojo ni konstatas vian aprobon k dankas viajn korajn esprimojn. Kolektivan saluton al ĉiuj anoj! Dankon pro via monsendo.

J. B.—London.—Ĉiam ĝojigas nin la legado de viaj regulaj leteroj k ne estis escepto ĉe la lasta (18.11) kies tekston ni bone notis kun agrabla konsento.

# MULTAN ATENTON!

Sub la patronado de la Generalitato de Katalunio, la ĵurnalisto K-do. O. Kupperman, gvidanto de la Esperanto-Fako en la komisarejo de Propagando, komence de januaro, vojaĝos eksterlanden kun migranta ekspozicio por prelegi en samideanaj rondoj pri la epopea batalo de Hispanio. Estos vizitataj jenaj landoj: Francio, Belgio, Nederlando, Britio, Norvegio, Svedio, Danio; eventuale Estonio k Finnlando; ankaŭ eble Polio k Ĉeĥoslovakio. Krom en Esperanto la oratoro parolas ankaŭ en aliaj lingvoj.

Ĉiuj kluboj k grupoj pretaj aranĝi vesperojn tiucele estas petataj tuj interrilati kun la vojaĝonto:

O. KUPPERMAN
Comissariat de Propaganda
Av. 14 d' Abril 442 bis BARCELONA

## AL TERORLANDANOJ

Ni kaptis jenan sciigon el terorlando (Aŭstrio): «Regule mi ricevas vian gazeton POPOLA FRONTO. La ĵurnalo ĉiam kaŭzas grandan ĝojon en nia rondo de samideanoj. Mi petas al vi daŭrigi la sendadon sammaniere. Tiu via metodo por atingi tion, estas tre, eĉ la plej, bona». Niaflanke, ni aldonas: Terorlandanoj, kiuj deziras ricevi POPOLA FRONTO-n, sin turnu al nia peranto en Nederlando, kiu zorgos tuj pri la afero.

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Haigne
Poŝĝiro 199106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechalls
BIRMINGHAM 7

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Postĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia